

Nederlanda Katoliko

Maandblad, Officieel Orgaan van den Nederl. R.-Kath. Esperantistenbond „Nederlanda Katoliko”, gevestigd te 's Hertogenbosch, opgericht 29 Augustus 1909, bisschoppelijk en koninklijk goedgekeurd.

Ĉion per amo, nenion per forto. (*S. Franc. de Sales*).

EERSTE ROOMSCH KATHOLIEKE

Levensverzekering-Maatschappij

:- te HAARLEM, Kleverpark 67 -:

Nu de concurrentie uitgeput raakt met haren voorraad materiaal om deze instelling te belasteren, wordt nog een laatste middel aangewend, n.l. een ongeteekend pamflet, waarvan de herkomst bekend is en onwillekeurig doet denken aan het pamflet „Dolk en Giftbeker”. — Jammer voor de verspreiders dat dit spelletje zoo doorzichtig is en daardoor onwillekeurig een schitterende reclame voor de E.R.K. wordt. Zie slechts haar steeds stijgend succes. De E.R.K. legt hare boeken open voor verzekerden en aandeelhouders. Lees hieromtrent de clause op de voorzijde harer tarieven.

ESPERANTO-EXAMENS, Diploma A en B. SCHRIFTELIJKE CURSUS.

Adres: H. J. BULTHUIS, Daguerrestraat 84, Den Haag.

Moerkerk-Banden.

Nog verkrijgbaar à f 0,25 franco per post, bij vooruitbetaling:
Omslagen voor den 1e, 2e, en 3e Jaargang van „Nederlanda Katoliko”. Luxe Papier. Bandteekening van Herman Moerkerk.

Adres: ST. CRISPIJNSTRAAT 57, 's-POSCH.

Een uitstekende Leermeester.

„DE MAASBODE” van 2 Juli 1911 schreef o.a. over het Leerboek der wereldhulptaal Esperanto door majoor J. P. L. NIESTEN: „Voor al voor hen, die niet aan een cursus kunnen deelnemen of geen hulp bij hun studie hebben, is dit een uitstekende leermeester.


Dit volledig leerboek met opgaven en uitwerkingen, bevattende 275 bladzijden kost slechts f 1,50.

Dit stelsel is o.a. ingevoerd op een groot aantal katholieke scholen, en en op een groot aantal kantoren, en wordt overal in de praktijk gebruikt. Het is het meest verbreide stelsel.

Dit systeem heeft geen verdikkingen; geen hoog- of laagplaatsing; geen nieuwe teekens of figuren voor verkortingen. Alle verkortingen kunnen in Hollandsche letter overgebracht, wat de duidelijkheid ten zeerste bevordert.

„Ook heb ik door de Stenografie reeds een „betere betrekking gekregen op een groot Handelskantoor”

(w.g.) Mej. J. H. te Br.



Stenografie
RIËNTS BALT.

Zelfonderricht 80 ct. Verkortings-systeem f 1,00. In den Boekh. en teg. postw. bij RIËNTS BALT, Den Haag.

ESPERO KATOLIKA.

Internacia monata gazeto.

Honorita per Apostola Beno de Pio X-a, 27-an de Junio 1906.

Oficiala Organo de

Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (I.K.U.E.)

Religia Direktoro: PASTRO RICHARDSON.

Redaktoro: D-RO SMULDERS.

Administranto: S-ro F. SLEIJFFERŠ, Prins Hendrikstr. 93, Den Haag.

Jara abono 2 Sm. (antaŭpagota).

Nederlanda Katoliko

Maandblad, Officieel Orgaan van den Nederl. R.-Kath. Esperantistenbond „Nederlanda Katoliko”, gevestigd te 's Hertogenbosch, opgericht 29 Augustus 1909, bisschoppelijk en koninklijk goedgekeurd.

Ĉion per amo, nenion per forto. (*S. Franc. de Sales*).

<p>Hoofdredacteur : J. N. J. Smulders, Arts te Udenhout.</p> <p>Abonnementsprijs, p.jaar, franco p. post, bij vooruitbetaling Nederland (niet-leden). . . . f 1.— België Sm. 0,87 = - 1,06 Andere landen (aliaj landoj) Sm. 1,04 = - 1,24 Afzonderlijke nummers 10 cent.</p>	<p>E S P E R A N T O</p>	<p>Redactie en Administratie : H. Damen, St. Crispijnstr. 57, 'sBosch.</p> <p>Advertentieprijs, per regel 10 cts. Bij geregelde plaatsing aanzienlijke korting. Voor inlichtingen wende men zich tot de administratie.</p>
--	---	--

PARKURBO ESPERANTO.

OFICIALA RAPORTO

de l'Sekretario de la Propaganda Ligo „Parkurbo Esperanto”, V.N. Devjatnin pri la agado de l'Ligo en 1912.

Propaganda Ligo „Parkurbo Esperanto” estis fondita la 8 - an de Junio 1912 kaj estas oficiale enskribita en la Societregistron de la Reĝa distrikta juĝo en Munĥeno sur la paĝo X, N 2 de la 1 - a de Julio 1912 („E.V.” t.e. „Enskribita Scio-eto”).

La celo de la Ligo, kiel oni povas vidi en la konfirmita regularo, estas duobla : a) ĝenerala - progresigo de la intereso por la Esperanta movado kaj b) speciala - akcelado de la koloniigo de Parkurbo Esperanto.

Ĝis la fino de l'raportata jaro al

la Propaganda Ligo aliĝis 3782 personoj, inter kiuj, laŭ la propono de la Komitato de l'Ligo, enskribiĝis, kiel honoraj membroj, jenaj peronoj:

- 1) Nia kara Majstro D-ro L. Zamenhof, la kreinto de Esperanto; 2) Generaleŭtenanto von Belli de Pino, reĝa kortegano; 3) Barono Karl von Branca; 4) Baronino Rosa von Karg-Bebenburg; 5) Ludwig Parkus, komerca konsilanto; 6) Grafo Josef Pestalozza; 7) Grafino Elsa Pestalozza; 8) Ludwig du Jarrys, Barono de la Roche, reĝa kortegano, eksmajoro; 9) Fany du Jarrys, Baronino de la



Roche; 10) Grafo Adolf Westarp; 11) Rusa Generalo A. Andreev, milita juĝisto; 12) S-ro A. Cefeĉ, komercanto, fondinto de Esperanta Banko en Londono, fame konata aŭtoro de diversnaciaj esperantaj ŝlosiloj; 13) D-ro de medicino A. Naŭmann, praktikanta kuracisto en Varsovio; 14) S-ro Pujula y Valles, Prezidanto de Kataluna Esper. Federacio en Sabadell (Hispanujo); 15) F-ino Adela Sefer, konata verkistino, lingvokomitatanino (en Londono); 16) S-ro H. Hodler, Direktoro de U.E. A. (Genevo-Svisujo); 17) Abato Richardson, Profesoro de Instituto St. Louis en Bruxelles (Belgujo); 18) Prof. Chistaller, lingvokomitatano; 19) D-ro Leono Rosenstock (el Krakovo), kuracisto.

Kompreneble, ke nun, kiam niaj karaj belegantoj havas antaŭ la okuloj tiun ĉi raporton, la nombro de aliĝintoj multe pligrandiĝis, ĉar ĉiutage en la Oficejo de l'Propaganda Ligo estas ricevataj dekoj da leteroj el diversaj landoj de la tuta mondo kun anoncoj pri la aliĝo (antaŭ nelonge, ekzemple, aliĝis la tuta Stiria Societo kun ĉiuj siaj 144 anoj),

Nuntempe la oficistaro de l'Centra Oficejo de la Propaganda Ligo konsistas el jenaj personoj: Direktoro s-ro Fr. Sievers, arkitekturisto; Sekretario - s-ro V. N. Devjatnin, Lingvokomitatano; Kasisto - s-ro O. Schuler juna; Kancelario: Fi-ino B. Hauck, s-ino K. Bossé kaj f-ino G. Zwinkel; Tehnika fako s-ro L. von Froenau.

Dum la raportata jaro s-ro Sievers ellaboris detalan planon de la konstruota Parkurbo kaj multajn desegnojn kaj planojn de apartaj konstruaĵoj, kiuj estis disdonitaj kaj dissenditaj senpage en ĉiujn landojn de la tuta mondo en grandega nombro da ekzempleroj.

Estis presitaj multegaj propagandaj broŝuroj kaj folioj, kiel, ekzemple: flugfolio en formo de gazeto „Espe-

ranto-Propaganda” kun kelkaj propagandaj artikoloj en Esperanta kaj en Germana lingvoj („Kio estas Esperanto?”, „Esperanto en ĉiutaga vivo” k.t.p.); propagandilo „Esperanto sur unu folio”, enhavanta Esperantan gramatikon en germana lingvo kaj garmane-esperantan fundamentan vortaron; apartaj esperantaj propagandiloj en germana lingvo: „Was ist Esperanto”; alvoko al la paco, kiun donos Esperanto en la Parkurbo; alvoko al neesperantistoj pri aliĝo al la Propaganda Ligo; alvoko al neesperantaj komercaj firmoj akcepti Esperanton por siaj interrilatoj; fine, estis presita en Esperanta kaj en Germana lingvoj granda ilustrita prospekto pri Parkurbo Esperanto kaj pri la Societloterio. Tiu ĉi propaganda broŝuro havas antaŭ la titolo, kiel devizon, kvarversan poeziaĵon de s-ro V. N. Devjatnin:

Karaj gefratoj, antaŭen sen timo!

Gardu kuraĝon en via animo!

Nia smeralda standardo kun stelo

Nin alkondukos sendube al celo!..

Ĉiuj tiuj ĉi presaĵoj kaj multaj aliaj (aliĝiloj, regularoj, varblibretoj k.t.p.) estis dissenditaj ankaŭ senpage en grandega nombro kaj estas disdonataj ankoraŭ nun al ĉiuj interesusuloj.

En Oktobro de la raportata jaro la Propaganda Ligo komencis la organizadon de Esperantaj kursoj, kaj nun en Munĥeno ekzistas du kursoj: - komenca en hotelo „Reichshof” kaj la supera en kafejo „Lohengrin” kaj unu komenca kurso en urbeto Gräfelfing apud Munĥeno.

Ĉiuj kursoj, gvidataj de Lingvokomitatano s-ro V. N. Devjatnin, laŭ lia propa natura metodo, estas tre volonte vizitataj kaj havas evidentan grandan sukceson.

La intereso al la entreprenoj de la Propaganda Ligo ĉiam pli kaj pli kreskas. Pri tio atestas la artikoloj en multaj naciaj kaj preskaŭ en ĉiuj esperantaj gazetoj kaj multegaj entu-

ziasmaj leteroj, kiujn ĉiutage estas ricevataj de la Propaganda Ligo kaj el kiuj mi nur kelkajn prezentas al miaj gelegantoj.

1) De nia kara Majstro D-ro Zamenhof: „Karaj Sinjoroj! Kun plezuro mi ricevis vian leteron kaj ankaŭ la diversajn presaĵojn kaj la 2 loteriajn biletojn. Pro ĉio volu akcepti mian koran dankon. Mi ĝojas pro la sukcesoj de la Propaganda Ligo. La titolon de honora membro mi danke akceptas. Via L. Zamenhof.

2) De s-ro Reinking el Braunschweig: „Estimataj sinjoroj! Mi devas peti pri via pardono, ĉar en Danzig - Zoppot, aŭdinte pri la entrepreno, kies animo certe estas vi, mi dubis pri ĝi. Via prospekto instruas min, ke miaj duboj ne estas pravaj...”

3) De la „Internationale Hilfssprache” en Middelheim: „Ĵus mi estas leginta pri via eminenta entrepreno, kaj mi esprimas al vi miajn gratulojn. Ĝi kresku kaj floru!...”

4) De la Universala Esperanto Asocio el Chicago: „Karaj samideanoj! Via sendaĵo alvenis hieraŭ kaj agrable surprizis min. Mi kredas, ke la afero estas bona propagandilo por nia afero en Chicago. Kvankam mi ne volas paroli je la nomo de la tuta societo, tamen mi povas diri, ke la anaro de tiu societo entuziasme akceptos vian sciigon...”

5) De la prezidanto de Esperantista Societo „Merkur” en Berlino: „Mi ricevis vian cirkuleron pri via entrepreno kaj gratulas vin kore pro tiu ideo. Kun vi mi esperas, ke ĝi montriĝos efektivebla. Mi povas, kiel prezidanto, alkonduki al via entrepreno ĉirkaŭ 100 anojn.”

6) De s-ro R. Wohlstadt (Esperanto-Auskunftei) el Ludwigslust: „Estimataj samideanoj! Aŭdinte kaj leginte pri via grandioza entrepreno, mi ĝentile kaj insiste vin petas, bonvolu sendi al mi ĉiujn presaĵojn kaj publikaĵojn pri la Parkurbo, ĉar

mi intencas fari vastan propagandon ankaŭ pere de la ĉi tieaj gazetoj...”

7) De s-ro Nivard el Groningen (Nederlando): „Estimataj sinjoroj! Mi kun grandega intereso legis en „Esperanto” la artikolon pri Parkurbo Esperanto. Na estas eble, laŭ mia simpla opinio, ke esperantisto, fervora aŭ ne, okupata aŭ nenion faranta, ne volus scii almenaŭ pluajn detalojn pri ĉi tiu granda afero, kiu ŝajnas al mi tiel interesa...”

8) De s-ro Cosmo Ricca el Genova (Italujo): „En la neebleco partopreni persone en via sankta agado, mi kunigas min spirite al via celo kaj mi kore salutas la noblan iniciativon de Propaganda Ligo, dum mi sendas miajn plej sincerojn bondezirojn, por ke Parkurbo Esperanto kresku, plikresku kaj pligrandiĝu en mirinda maniero kaj precipe ke ĝiaj loĝantoj per la ecoj de libereco, progresamo kaj homaramo, kiuj ilin distingas, estu modelo de Dia regno sur tero.”

9) De s-ro Em Batek, lernejestro en Ričany (Bohemujo): „Karaj samideanoj! Esperanto kaj ĝiaj pacaj batalantoj vivu! Laŭ tiu ĉi devizo mi aliĝas al via grandega entrepreno kaj deziras al via bela ideo multe da sukceso!”

10) De Profesoro Christaller el Stuttgart: „Ni kun ĝojo ekceptis la sciigon pri ĝi (pri Parkurbo Esperanto) kaj mi sendis artikolojn al kvar gazetoj.”

11) De s-ro prezidanto de Esperanta grupo en St. Ingbert: „Liston de la grupmembroj, kiuj aliĝis al la Propaganda Ligo mi en la proksima samajno sendos al vi. Plezure kaj grandinterese oni akceptis ĉi tie la projekton de vi akcelitan.”

12) De ukrainano s-ro Anotolo Koh el Varsovio: „Mi tre volonte, ĝoje aliĝas al la Propaganda Ligo. Ne lasu la aferon, karaj kunfratoj, ĝis vi ĝin efektivigos”.

13) De s-ro B-no Rifling el Kris-

tiania (Norvegujo): „Mi sincere aliĝas al via grandioza ideo!

14) De s-ro Michal Postek el Raciborowice (Galicio): „Via entrepreno havas egan signifon por disvolviĝo de Esperanto.“

15) De rusa generalo s-ro A. Andreev el Tifliso: „Altestimataj sinjoroj! Mi ne havas vortojn, por gratuli vin kun viu grandioze ideo.

Parkurbo Esperanto! Kia venko! Kia triumfo por la tuta esperantistaro! De nun la mondo estas nia! Honoro kaj gloro al germanaj samideanoj!“

16) De s-ro C. Roncati el Nice (Francujo): „Karaj estimataj samideanoj! Entuziasmita, mi tuj aliĝas al la Ligo Parkurbo Esperanto. Bonvulo kalkuli min en la nombro de fervoraj propagandistoj de via grandioza ideo.“

17) De s-ro Strasser el Müdling (Bavarujo): „Mi sciĝis pri via majesta entrepreno. Mi kaj mia frato estas posedantoj de lignaĵista kaj ĉarpentista negoco, kaj eble ni vendos nian domon, por translokiĝi en Parkurbon.“

18) De s-ro Samuĉo Ŝulc el Lodz (Rusa Polujo): „Kun ĝojo mi tralegis pri la kreota rezidejo en Esperantujo, kiu certe fariĝos sankta pilgrimloko por ĉiu vera esperantistano. Mi promesas esti la unua pilgrimonto ĉiujare. Dezirante la plenan sukceson, mi restas fidela aliĝinto S. Ŝulc.“

19) De s-ino Anna Grineva el Staroĉerkash (Rusujo): „Karaj samideanoj! Hieraŭ mi tralegis en „Esperanto“ artikolon de s-ro Devjatnin kaj tutan nokton mi ne povis ekdormi! Sciigo estas tro bona, por esti vera!

Ĉu ĝi ne estas granda Aprila ŝerco? Ni, frenezuloj, ĉiam revis pri nia propra ĉefurbo kaj nun tiuj ĉi revoj efektiviĝos. Akceptu mian gratulon kun tia feliĉo kaj koran saluton.“

Ne daŭrigante longan vicon da multegaj similaj leteroj el ĉiuj landoj de la tuta mondo, mi volas nur

prezenti al miaj gelegantoj unu oficialan dokumenton: ĝi estas cirkulero, presita en N 9 10 de „La Esperantisto“ de la nomo de Germana Esperanto-Asocio al siaj anoj.

Zirkular No. 4.

Parkurbo Esperanto.

Sundube niaj anoj sentas grandan intereson por la nova Parkurbo en München Gräfelfing, pri kies fondo ili antaŭ nelonge estas sciigitaj per cirkulero de la Propaganda Ligo en München. La Prospekto promesis ja tiom, ke oni preskaŭ kredis aŭdi fabelon. Tial ni esploris la aferon, kaj jen la rezulto: La entreprenantoj de la fondo estas tre riĉaj viroj kaj eminentaj negocistoj. Ili aĉetis parte la fundon jam antaŭ kiam venis al ili la penso fondi Esperantan urbon, kaj ili konstruos sian urbon ankaŭ tiam, se la ideo de Esperanta urbo montros sin neebla. La teĥnika parto de la entrepreno kuŝas en la energiaj kaj tre spertaj manoj de l'arĥitekto Sievers, kies belegajn planojn oni jam konas. Por la Esperanto Ideo zorgas komitato, konsistanta el fervoraj samideanoj, kiu posedas la rajton, en ĉiuj aferoj, kiuj koncernas Esperanton, decidi memstare. Inter ili estas kelkaj juristoj, kies tasko estas la zorgo por la jura flanko de la afero. La entrepreno do havas ĉiuflanke seriozan kaj solidan bazon. Ĉu la celo de la entreprenintoj estos atingita, dependas nur de la mezuro, en kiu la propagando por la nova fondo trovos eĥon en la tutmonda Esperantistaro. Ni povas garantii, ke nia fonto estas absolute seninteresa kaj kompetenta persono, kies juĝo estas nepre fidinda. Por akceli la sukceson, ni rajtas rekomendi al nia anaro, montri varman intereson por la nova keraĵo kaj partopreni la propagandon por ideo, kies efektivigo ankoraŭ antaŭ malmultaj jaroj nur ŝajnis bela sonĝo.“

Kompreneble mi ne povas citi ĉiujn dokumentojn, kiujn posedas la

Propaganda Ligo, ĉar ili estas tro multnombraj; sed ŝajnas al mi, ke la supre prezentitaj estas tute sufiĉaj, por montri, ke la Propaganda Ligo kun siaj entreprenoj iras renkonten al la deziroj de tuta nia Esperanta mondo.

La disvendado de la lotleteroj de la Societloterio, dank' al amika subteno de niaj gesamideanoj, ankaŭ sukcese iras antaŭen, kaj pro tio la Propaganda Ligo decidis daŭrigi ĝin ankaŭ en tiu ĉi kaj en la proksima jaro, ĝis kiam ĉiuj biletoj de ĉiuj dek serioj estos disvenditaj.

Ĝis nun multaj personoj - esperantistoj kaj nove aliĝintoj - gajnis diversajn sumojn, grandajn, kaj malgrandajn kaj estas tre agrable konstati la fakton, ke multaj aĉetas la lotleterojn ne nur por gajni, sed por subteni la malfacilajn entreprenojn de la Propaganda Ligo, aliĝi al ĝi kaj komenci la lernadon de Esperanto. Jen ekzemplete karaktera poŝtkarto, antaŭ nelonge ricevita de mi el Heiligenkreuz (apud Vieno) de Kleriko Eugenio Franiĉ: „Plej estimata s-ro Sekretario! Samtempe kun ĉi tiu vidaĵkarto estas alsendota la mono por ricevi dekduon da lotleteroj. Nia malganda, de nelonge ekzistanta grupo de ĉi tieaj klerikoj, transsendas kelke da ŝparitaj markoj ne kun juneca espero gajni la belegan konstruotan dometon en Parkurbo aŭ centon da markoj, se jam ne milion, - sed certe kun volo por helpi al komuna nia ideo. Dezirante al nia! Parkurbo kaj ĝia estraro plenan sukceson kaj baldaŭn tutan disvendon de la biletoj, kun sinceraj salutoj restas samideano Eugenio Franiĉk.

Tiu ĉi fakto estas des pli agrabla, ke ĝi montras, ke niaj samideanoj ĝuste komprenis la taskojn de la Propaganda Ligo, ke ĉiame kutima skeptikeco de la plej granda parto de niaj samtempuloj (precipe ne esperantistoj) estas venkita kaj oni kredas jam, ke la fondintoj kaj la gvi-

dantoj de l'Ligo celas ne nur siajn materialajn profitojn, sed antaŭ ĉio la profitojn de nia Esperanta movado, kiu per neniam aliaj rimedoj povas esti antaŭenpuŝita tiel forte kiel per la entreprenoj de la Propaganda Ligo. Efektive: pripensu, kio estas Esperanta urbo, kiun intencas konstrui la Propaganda Ligo? Ĉu povas esti io alia pli grandioza, ol tiu ĉi mirinda entrepreno? Kaj ĉu mi devas paroli pri ĝia signifo por la Esperanta mondo? Evidente, ke tio estos same superflua, kiel argumenti, ke duoble du estas kvar.

Sed, por efektiviĝi tiun ĉi ideon, ne estas sufiĉe nur deziri ĝin, oni devas havi por tio necesajn rimedojn, monrimedojn, grandajn monrimedojn, kiujn al ni neniu povas doni, se eĉ inter niaj gesamideanoj subite aperus iu milionulo, kiu ekvolus nin helpi, ĉar li ne povus oferi por nia afero sian tutan havon. Sed kion ne povas fari unu sola persono, tio facile povas esti farita de multaj, ĉar en unuigo estas forto.

Kaj jen naskiĝis la ideo pri Societloterio, kies ebla profito donos al la entreprenantoj la eblecon enkorpiĝi la ideon pri la konstruo de Esperanta urbo.

Kompreneble, la entreprenantoj devas ricevi siajn elspezojn kaj eĉ gajni almenaŭ iom super la ricevota kapitalo, kiu nun estas metita al la dispono de la gesperantistaro kaj kiu ebligis al ni la efektivigon de l'bela sonĝo de l'Homaro. Tio estas tute nature kaj juste, ĉar nuntempe neniu volas riski sian kapitalon kaj sian laboron, ne esperante ion gajni: oni devas bone memori la principon, „ke ĉiu laboro devas esti rekompencata”.

Bedaŭrinde, kelkaj (cetere, tre malmultaj) opinias, ke la fondintoj de la Propaganda Ligo celas nur siajn komercajn profitojn, kiuj havas nenion komunan kun Esperanto kaj Esperantismo.....

Tiu ĉi opinio estas tiel evidente absurda, ke mi eĉ nenion volus kontraŭdiri, se al tio min ne devigus la premita de mi tasko de senpartia raportanto. Do, mi respondas.

Ni trostreĉu nian fantazion kaj ni imagu, ke la entreprenantoj efektive havas nur komercajn celojn. Tamen, ili fondas Propagandan Ligon kaj intencas konstrui Parkurbon Esperanto. Do, ĉu ili malgraŭ tio havas nenion komunan kun Esperantismo? Ili presas centojn da miloj de propagandaj folioj, broŝuroj, kiujn ili dissendas tra la tuta mondo; ili aranĝas esperantajn kursojn, kiujn gvidas intence invitita specialisto Profesoro.... Ĉu tio ankaŭ montras, ke ili havas nenion komunan kun la Esperantismo? I.... Kiel estas strange, ke homoj iafoje pro apartaj arboj ne vidas la arbaron!....

Mi ke kfoje en miaj artikoloj diris, ke nun forpasis tiu unua tempo, kiam ni, la unuaj malnovaj pioniroj, estis forlogataj nur de la ideala flanko de nia movado, — kaj ni tute ne domaĝas pri tio, ĉar ni vidas, ke Esperanto tiel profunde penetris en nian modernan vivon, ke oni jam ne vidas en ĝi celon, sed nur unu el potencaj rimedoj por vivo, — kaj se nun ekzistas multaj personoj — kaj ili efektive ekzistas: mi, senpartia raportanto, estas viva argumento de la vereco de tiu ĉi supozo, — do, se ekzistas multaj personoj, kiuj vivas nur per Esperanto, tio devas ĝojigi la korojn de ĉiuj veraj konsciaj esperantistoj, ĉar ili povas konstati nerefuteble, ke Esperanto kaj Esperantismo estas tiaj grandaj fortoj, kontraŭ kiuj oni ne povas jam batali, kaj la mondo devas konfesi sin venkita!....

Sekve, la fondintoj de la Propaganda Ligo Parkurbo Esperanto kaj la organizintoj de la Societloterio, se ili estas eĉ nur profiteblaj komercantoj, ĉiaokaze faras nemezureble grandan servon al Esperanto kaj Esperantismo, ĉar ili malgraŭ ĉio bonege

propagandas nian grandan ideon, kaj mi estas tre ĝoja konstati la fakton, ke niaj gesamideanoj tion komprenis kaj laŭpove subtenis kaj subtenas ilin ne nur morale per siaj entuziasmaj kurajgaj kaj gratulaj leteroj, sed ankaŭ materiale — per aĉetado de la biletoj del'organizita de ili Societloterio.

Dank' al tia konstanta fervora subteno, ni havas la rajton esperi, ke jam dum tiu ĉi printempo, kune kun la vekigo de l'naturro, komenciĝos ankaŭ la konstruado de la Parkurbo Esperanto, kaj la lastaj duboj de kelkaj tre malmultaj skeptikuloj forflugos, kvazaŭ fumo!

Do, vivu Esperanto kaj ĝiaj pacaj betalantoj, kaj

„Antaŭen sen timo, kun kredo en animo!“....

V. DEVJATNIN.

OFICIALA PARTO.

Attentie !!

*Aan de plaatselijke vereenigingen
van „Nederlanda Katoliko“!*

De jaarvergadering zal op Zondag 20 April a.s. gehouden worden te 's-Hertogenbosch. De beschrijvingsbrief die o.a. de ingediende voorstellen zal bevatten, zal vóór den 20sten Februari aan de Secretarissen(essen) der plaatselijke vereenigingen worden toegezonden en worden opgenomen in het Maart-nummer van „N.K.“

Amendementen op de voorstellen moeten één maand voor de te houden jaarvergadering worden ingediend bij den 1sten Secretaris van den Bond.

Tevens wordt eraan herinnerd dat elke plaatselijke vereeniging een harer leden moet kiezen voor lid van het Bondsbestuur. Naam en adres van dit lid moet zoo spoedig mogelijk worden opgegeven aan den 1sten Secretaris van den Bond.

Elke plaatselijke vereeniging kan kandidaten opgeven voor het kiezen van 7 leden van het Dagelijksch Bestuur. Tot leden van het Dagelijksch Bestuur zijn alle leden der plaatselijke vereenigingen en begunstigers verkiesbaar en kunnen dus candidaat gesteld worden.

Candidaten voor het Dagelijksch Bestuur kunnen tot één maand vóór de te houden jaarvergadering worden opgegeven aan den 1en Secretaris van den Bond. Het Bondsbestuur kiest op een daartoe uit te schrijven vergadering het Dagelijksch Bestuur uit de opgegeven kandidaten.

Voor het Dag. Bestuur,
H. B. VAN ZWET. 1e Secr.

Ŝanĝoj en la anara listo ĝis la 15a de Januaro 1913a.

FAVORANTOJ.

Nova:

S-ro P. Heilker, Hoofd der School Hoofddorp.

UNUIĜOJ.

Cuijk.

La Eĥo de la Kujklando.

Novaj membroj :

S-ro L. de Groot, Gennep.
S-ro H. Hamacher, Gennep.
S-ro M. Mazirel, Gennep.
S-ro Jac. v. Aarsen, Oeffelt.
S-ro R. v. Dinter, Dreumel, (Geld.)

's-Gravenhage.

Estrarŝanĝoj :

Prezidanto : S-ro J. M. Maury, Groot-Hertoginnelaan 121.

Subprezidanto : S-ro J. J. Mol, Visschersdijk 10a.

1a Sekretario : S-ro H. F. Pothast, Brueghelstraat 63.

2a Sekretario : S-ro E. A. M.

Govers, Westeinde 6,

1a Kasistino : F-ino J. M. E. Pothast, Brueghelstraat 63.

2a Kasistino : F-ino A. Evers, Spui 225.

Helpanto : S-ro G. van Ooijen, Engelburgstraat 76.

Helpanto : S-ro N. R. Meijer, Badhuisstraat 3, Scheveningen.

Tilburg.

Estrarŝango :

Sub-prezidanto : S-ro Adr. Sanders, Poststraat 36.

Novaj membroj :

F-ino A. de Rooij, Beekschedijk 34.

„ H. Schoonis, Hasselstraat 183

„ M. Schenkels, Prinses Sophiastraat 42.

F-ino L. v. Berkel, Bosscheweg 153.

S-ro P-o W. Smulders, Kapelaan, Korvel.

S-ro L. Wouters, Trouwlaan.

„ J. J. de Bont, Goirke 29.

„ F. Damen, Willem II straat 70.

„ J. de Natris, Wolstraat 21.

„ A. de Laat, Bredascheweg.

„ J. Donders, Korte Schijfstr. 18.

„ A. Minderhout, Z. Oosterstraat 75.

S-ro L. v. d. Heijden, Goirlescheweg 8.

S-ro F. Cools, Goirkeplein 32.

Uden I

Udeno.

Estrarŝanĝo.

Sekretario : S-ro J. G. Coenen.

PETO!! Ni petas insiste al la Sekretarioj (inoj) de la unuiĝoj ĉiam sendi la ŝanĝojn en la anara listo antaŭ la 15a de ĉiu monato al la ĉefsekretario de Nederlanda Katoliko S-ro H. B. van Zwet, Leeuwstraat 3bis Utrecht.

Saman peton al la favorantoj pri adresŝanĝoj.

Plendojn, pri la neregula ricevo de nia organo „Nederlanda Katoliko” al la sama adreso.

ENLANDA KRONIKO.

Tiel faru ĉiuj!

Estis la 10a de Januaro, kiam unu de l'plej malfruaj tramoj kondukis min el Roterdamo Ŝhidamon.

Kiel ĉiam mi portis la verdan stelon, en kiu majeste sidanta la blank-flava kruceto. La kondukisto, ĝoja sendube, ĉar sur mia supervestkolumo li vidis brili en la hela lumo elektra la stelon de l'espero, alparolis min jam baldaŭ: „Ĉu vi parolas esperante, Sinjoro?” al kiu demando mi jese respondis. Interparoladi ni ne povis regule pro la servado de la samideano, sed li profitis de l'malmultaj momentoj kaj ne plu unu vorton nederlandan diris al mi la membro de „La Verda stelo” (klubo Roterdama de tramkondukistoj) kaj de U. E. A. Kaj estu dirata, ke nek flue nek perfekte li ankoraŭ parolis nian lingvon. Sed tiu-ĉi estas la ekzercado, ĉi-tiu la periodo, kiun ĉiu devas trairi dum la lernado de ia ajn fremda lingva. Kvankam malĝojaj cirkonstancoj min vokis hejmen, mi estis tamen ĝoja, alloginte per mia insigno samideanan paroladon.

Semajnon poste mi denove revenis Ŝhidamon kaj pensante ankoraŭ al mia esperanta parolado, kiun ĵus mi rakontis, aliafoje mi estis alparolata de kunvojaĝanto. Estis kondukisto, sed ekster servado. Esperantisto kaj membro de „la Verda Stelo”, li uzis lingvon nian kaj mi garantias vin, ke miregigis min lia parolado, kiu supozigis laboreman ekzercadon.

Kiuj do devas esti miaj konkludoj?

1e. Portu ĉiuj Esperantistoj la verdan stelon, kaj ni, Katolikoj, nian

specialan insignon kun blank-flava kruceto.

2e. Kuraĝu ni ankoraŭ paroli, eĉ kiam ni ne konas ankoraŭ perfekte nian lingvon. Voli estas povi; ekzercado naskas arton. Pro ekzercado ni devas paroli esperante inter ni; ĉi-tiu tamen ne estas la bildo de l'estonto: estus forpuŝo de l'idiomoj naciaj, se sampatrujanoj parolus ĉiam esperante. Estas ankoraŭ forta propagando, ĉar laŭ mia opimo modesta esperanta interparolado faras impreson ĉe la ĉeestantoj, kiuj tiam aŭdas, ke *Esperanto reale ekzistas kiel lingvo parolebla kaj jam parolata.*

3e. Aniĝu ĉiuj Esperantistoj katolikaj al nia ligo N.K., al ĝiaj lokaj sekcioj tie kie jam ekzistas tiuj aŭ fondiĝos.

La kondukisto ekzemple, kiu min alparolis tiel flue en nia lingvo kaj kiun mi scias esti samreligiano, ne estas membro de N.K. Kaj ni bezonas Esperantistojn Esperante parolantajn.

4e. Honoro al la kondukistoj, kiuj tiamaniere faras propagandon sanan kaj potencon. Estu baldaŭ permesata al ĉiuj porti nian insignon kaj uzu tiam vagonar- kaj tramoficistoj tiun permeson: ili briligu sur sia brusto la stelon de l'espero, sed portu ili ankoraŭ en koro varmegan sindonemon al nia lingvo kaj movado!

Ŝhidamano.

Unua Nederlanda Nacia Kongreso Esperantista.

Okaze de la jarkunveno de Nederlanda Societo Esperantista „La Estonto estas nia” la 27an de Julio 1913 en Hago, la Haga Grupo organizas nacian tritagan kongreson. Ĉar Hago en tiu ĉi jaro pro la malfermo de la Pacpalaco kaj pro la festoj pri la centjara sendependeco estos centro de vizitado de fremduloj, la Kongresa komitato invitas ĉi-

ujn gesamideanojn grandnombre partopreni tiun kongreson. Baldaŭ aperos programo kun aliĝilo. Por informoj oni sin direktu al la sekretario de la Kongresa Komitato s-ro J. R. G. Isbrücker, Riouwstr. 169 Hago. Holando.

Handelsblad van Tilburg.

Welke mede-Esperantist kan mij, tegen vergoeding, helpen aan de volledige serie *Handelsblad van Tilburg* en omstreken, met de Esperanto rubrieken?

N. BOON.

Kon. Emmakade 96.

Den Haag.

Amsterdam. Laŭ decido de la 20a de Januaro la regularo de „Nia Kredo” estas reĝe aprobita.

Ni sciigas, ke s-ro P. Jansen, prezidanto de la Katolika Esperantista grupo „Nia Kredo” parolados fine de Februaro por la Katolikaj Poŝtistoj, pri la utilo de lingvo internacia.

Rotterdam. La 13an de Januaro okazis ĉi tie la jarkunveno de la Roterdama Katolika Esperantista Societo.

Nia prezidanto, Lia Moŝto Sinjoro J. P. L. Niesten malfermis la kunvidon per la kristana saluto, deziris al la ĉeestantoj koran bonvenon, komunikis tre multe pri la laboroj en la pasinta jaro kaj esprimis la deziron, ke nia movado tiun ĉi jaron kresku pli ol en la jaro pasinta.

La programo estis tre granda:

1. Malfermo de la prezidanto.
2. Raporto de la sekretario.
3. Raporto de la kasisto.
4. Elekto de la estraro.
5. Elekto de membro por la Ligo-estraro de „Nederlanda Katoliko”.

6. Aliaj punktoj.

Post legado de la raporto pri la antaŭa kunveno, la sekretario ankaŭ legis la jarraporton de la pasinta jaro, citante la malprogresadon de la membroj-nombro, ĉar la Roterdama grupo perdis en 1912 pli ol 50% de la membroj.

La kasisto raportis pri en-kaj elspezoj, kaj la bilanco fermiĝis kun saldo de f 13,05.

Oni reelektis la estraron:

Sinjoro: J. P. L. Niesten, Prezidanto.

Sinjoro: Ferdinand Schneiders, sekretario.

Sinjoro: C. L. Deltenre, Kasisto.

” J. van den Tillaart kaj

” G. J. Heetman, helpantoj.

Kiel membron por la Ligo estraro estis elektata la prezidanto Sinjoro Niesten.

Je la fino de la kunveno oni ankoraŭ decidis teni propagandan paroladon pri Esperanto en Februaro aŭ Marto 1913.

F. SCHNEIDERS.

Tilburg. Nia jarkunveno okazis la 23an de Januaro. La notoj kaj la jarraporto estis akceptataj. Ankaŭ la kasisto prezentis raporton Li sciigis al ni, ke la jaro 1912 pasis por ni sen ŝuldoj. Komitato estis elektata, kiu kontrolis la librojn de l' kasisto. Nia klubo pligrandiĝis per 17 novaj membroj. La prezidanto estis reelektata kiel estrarmembro de N.K. La estrarmembroj de nia klubo, fraŭlino H. Claassen kaj Sinjoro Th. v. Riel ankaŭ estis reelektataj. Sinjoro L. Hardy, kiu eliris el nia estraro, estis anstataŭata de sinjoro A. Sanders. Nun komencis la preparado de nia propaganda tago, tenota dum la granda internacia ekspozicio en nia urbo. La tago estas fiksita je la 6a de Julio. Dekduo da personoj promesis ke ili kune kun la estraro kaj la propaganda klubo volas labori, por ke tiu tago estu tiel eble

plej sukcesa. Ni vendis 1000 esperantajn sigelmarkojn inter la ĉeestantoj, kiuj ĉiuj aprobis la proponon de l'estraro: membriĝi al la unuiĝo: „Ned R. K. Vereeniging tot bevordering van den wereldvrede“. Por fermi la kunvenon oni kantis: „Himno Katolika“.

La sekretariino,
Th. v. A.

Utrecht. Nova kurso komencis en Januaro. 13 Partoprenantoj.

Z.

JAARVERGADERING te 's-Hertogenbosch.

Op Zondag 9 Februari vergaderde het Dag. Bestuur van „Nederlanda Katoliko“ te 's-Hertogenbosch met het bestuur der afdeeling aldaar, o.a. tot bespreking en voorbereiding der op 20 April te houden jaarvergadering. De voorloopige plannen en dagorde door het bestuur der Bossche afdeeling ontworpen werden door het Dag. Bestuur goedgekeurd. In ons Maartnummer zullen wij het programma van den dag publiceeren. Ofschoon de dagbladen daarover reeds bijzonderheden mededeelden, mogen wij, inband daarmee wel even opmerken, dat de gepubliceerde bijzonderheden slechts een voorloopig karakter dragen, wat trouwens ook uit het bovenmedegedeelde duidelijk blijkt.

Mededeeling.

In den loop dezer maand zal de penningmeester beschikken over de contributie der begunstigers. Voor een zeer gewenschte regelmatige in-ning en ter voorkoming van overmatige correspondentie wordt beleefd verzocht daaraan dadelijk te voldoen of maatregelen daarover te nemen. Finantieele vlotte afwikkeling wijst op groeikracht en opgewekt bonds-

leven in onze Roomsche beweging.

De penningmeesters der vereenigen-ningen gelieven het eerste kwartaal voor 1 Maart aan mijn adres op te zenden, tenzij zij verkiezen voor het geheele bondsjaar 1913 reeds af te dragen. Zie art. 18, 2e alinea.

Bergen op Zoom, Februari 1913.
T. C. VAN ERP. Bondspenningm.
Antwerpschestraat 27.

Nova Sekcio!

Breda. Iam jam ekzistis en Breda Katolika grupo Esperantista, kiu tamen de la komenco ne bone floradis, kaj fine malestiĝis. Tio okazis proksimume antaŭ unu jaro. La Esperanta semo ne tute foriĝis tamen el la katolikaj rondoj Bredaaj. Restis agadi kelkaj fervoraj propagandistoj por nia kara movado, ĝis kiam ili juĝis matura la tempon por denove starigi sekcion de „Nederlanda Katoliko.“ Tiuj samideanoj do interrilatiĝis kun la estraro de nia ligo, pro morala kaj financa subteno de siaj klopodoj. Dimanĉon, la 26an de Januaro okazis la granda propaganda kunveno en la salono de la Katolika Rondo, kiu fariĝis plen-plena, je la anoncanta horo.

En la kunveno paroladis la estramembroj de nia Katolika Ligo „Nederlanda Katoliko: Prof. P-ro Linnebank kaj s-ro Kapitano v. Erp. Jam tiel ofte, estis sub tiu-ĉi rubriko raportata pri la sukcesplenaj propagandaj paroladoj de tiuj ambaŭ elokventaj oratoroj, ke neniu plu miros pri la nova ilia sukceso en Breda. Ĉar ne malpli ol 90 personoj tuj post la paroladoj aniĝis. Kune kun vortoj de laŭdo kaj danko por la paroladistoj, decas ke ni direktas dankvortojn al la provizora loka komitato, precipe al s-ro T. Post, kiu nun vidas multe rekompencata sian persistecon.

D.

BIBLIOGRAFIO.

Al mia Fratineto, letero pri la seksvivo de Felix Ortt, tradukita de A. Muller. Eldonejo „Chreestarchia” Soest Nederlando 1912. Prezo f 0.50 0.400 Sm.

La aŭtoro skribas leteron al sia fratineto, kiu ne povas kompreni kial ŝia onklino ne aprobus, ke ŝi legas diversajn romanojn, en kiuj ŝiaj amikinoj malkvris neniun malbonaĵon kaj kiuj estas legitaj de ŝiaj gepatroj. La onklino, kiu anstataŭas por la fraŭlino ŝian patrinon, sentis ke ŝi devus interparoli kun la dek-sesjara junulino, sed ne trovis sin kapabla pritrakti ĉiujn tiujn delikatajn aferojn kaj pro tio demandis ŝian frategon, ĉu li bonvolus fari tion.

La fratego tial parolas pri amo, edziĝo kaj seksvivo. Li diras, ke lia fratineto ne komprenos facile, kio amo estas, el la romanoj kaj romanetoj jam legitaj; sed ankaŭ ŝi ne komprenos ĝin facile el la interparolado kun la fratego. Precipe la klarigado, ke Dio estas amo, tial ke ĉio kio estas, estus unu kun Dio, estas ridebla kaj konsekvenco de la malsaĝa, monista, teosofia kaj boedha opinio, ke ĉielo kaj tero kreitaj de Dio ne ekzistas per propra ekzistado sed per la dia ekzistado, de kiu ili estas nur aperadoj, ĉiam sangindaj. Certe Dio estas amo, ĉar Li donas al ĉio, kio ekzistas, la ekzistadon kaj Li volas ke tiu ĉi ekzistado kiel bona restas. Per la dia volo, kiu estas amo, ne per la dia ekzistado, ĉielo kaj tero ekzistas

kaj per ĝia propra ekzistado montras, ke Dio estas amo.

Cetere, kvankam la klarigado de la signifo de la amo estas ridebla, ni povas jesi, ke en la enamiĝo kaj edziĝo amo estas sento de unuanimeco kaj ni devas konfesi, ke la konsideroj de l'aŭtoro pri la amo en tiuj statoj de vivo ne estas malbonaj, nur la suprenatura amo de la Kristanismo foriĝis je la atento de l'aŭtoro. Ankaŭ la paroloj pri la seksvivo estas prudentaj kaj decaj. *Sed ni devas rinarki*, ke tiuj paĝoj estas skribitaj por gefraŭloj, kiuj bezonas instruadon pri tiuj ĉi aferoj, kaj ke en tiu situacio estas multege preferinda, ke la gepatroj kaj la edukantoj de la gefraŭloj farus tian instruadon, kiam kaj kiel ili juĝas ĝin necesa kaj utila. Por ili la broŝuro estas escepte la paĝojn 10-11 pri la amo, pli rideblaj ol malutiluj - bona kaj legebla. Sed ĝi ne estu aĉetebla de la gejunuloj mem. Ĝenerale la gepatroj kaj la edukantoj ne bezonas libron por la instruado de siaj infanoj. Pro tio, tiu ĉi libreto, kvankam ne malbona, estas libreto sen multa utileco, kiu kontraŭe facile povas esti okazo, ke gejunuloj estos tro frue instruitaj pri aferoj, kiuj pli bone restas kaŝitaj al ili ĝis la tempo, kiam la instruado por ili estas juĝata necesa de iliaj gepatroj. Pro tio ni ne povas rekomendi tiajn eldonaĵojn. La Presaro katolika, kvankam ĝi volas respekti la celon, ne amas tiuspecajn libretojn,

Oss.

P. Dr. Titus Brandsma.

O. Carm.

's-Hertogenbosch 20 April 1913: Jaarvergadering van „Nederlanda Katoliko” Deze dag zal een zeer feestelijk karakter dragen. Bijzonderheden verschijnen in het Maartnummer.

Esperantodag - Tilburg - 6 Juli 1913

HAMMOND SKRIBMAŜINO LA PLEJ BONA!

La Hammond-Kopiejo.

Sin okupas pri la kopiado de tagordoj, cirkuleroj,
regularoj.

Same de

Leteroj, Polisoj, Diktaĵoj,
Kontraktoj, Protokoloj, Vendejaj kaj borsaj sciigoj k. t. p.
Sekretigeo, rapida liverado, neta kaj akurata faraĵo
garantiata.

*Sekretarioj de unuigoj, postulu nian specialan prezaron.
Diversaj referencoj estas disponeblaj.*

Amsterdamo. -:- Rokin 38.
TELEFONO 4443.



La „STELIOJ” - Cigaretoj estas fumataj
en Ĥinuĵo, Japanujo, Afriko, Indio, k.t.p.

En Eŭropa la uzado ĉiam kreskas.

PETEGU en via loko la „Steliojn”

(1 ĝis 4 c.)

Machinale Fabriek van Houtbewerking
„DE MARK”.

Jac. van Groenendael, Breda

Alle Timmerwerken, Speciaal in Eikenhout

KERKBANKEN - KERKSTOELEN

SCHOOLMEUBELS, enz.

Wie Sociale en Politieke lectuur wenscht te ontvangen wende zich tot
„FUTURA” - LEIDEN.

ĴUS APERIS :

Elementara Lernolibro

de

ESPERANTO.

P. A. SCHENDELER.

Prezo : 20 cendoj. — Prijs 20 cent.

Uitgave : **GEBR. BEK, Boekdrukkerij**

== **VEGHEL.** ==

Ter blijvende Herinnering

aan 12½-, 25- of 50-JARIGE FEESTEN,
bij VERJAARDAGEN of ter herinnering
aan OVERLEDENEN is niets waardiger
denkbaar dan in natuurgetrouwe olieverf-
kleuren geschilderde **PORTRETTE**

Peinture- 
 **Bogaerts**

PRIJZEN vanaf f 8.25, met breed
vergulde lijst.

H. BOGAERTS & Co.,
 **BOXTEL.** 

Hoogste onderscheidingen voor Schoone
Kunsten, Eere-Diploma's, Gouden- en
Zilveren Medailles.

**Geen portret mag behouden worden, dat
niet volkomen bevredigt.**